



LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando

Administracio: S-ro G. de Vries, R.P.I. Pav. AB, Bosdijk 771, Eindhoven, Nederlando

Giro Nro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

19-03-'53.

ESTIMATA SAMIDEANINO REDAKTORINO!

Antaŭhieraŭ mi ricevis februaran numeron de „La Juna Vivo“. Grandan, tre grandan dankon. Jam de kelkaj monatoj mi havas neniajn novaĵojn de fremdlandaj esperantistoj pri Esperanta movado en mondo. Tial la ricevita gazeto estis agrabla surprizo kaj vidata atesto, ke ekzistas kunligiteco inter esperantistoj de la tuta terglobo. Sed ankaŭ ĉe ni en Pollando Esperanto-penso vivas. Du ĉefaj centroj de polaj E-istoj ekzistas en Varsovio kaj Vroclavo.

Mi ne scias, ĉu vi havas nun en Pollando iajn perantojn aŭ korespondantojn, permesu al mi do skribi kelkajn sciigojn pri Esp. movado en nia lando.

Asocio de Esperantistoj en Pollando, sidejo en Varsovio, eldonas nuntempe monatan bultenon, daŭrigas korespond-kurson, faras vendadon de malmultaj Esp. lernolibroj, broŝuroj, libroj ktp. Ĝi estas reprezentanto de polaj E-istoj. En la fino de la pasinta jaro ĝi presigis vortaron „Pola-Esperanta“. Vortaro estas granda helpilo por ni junaj esperantistoj.

Vroclava Filio de Asocio de E-istoj en Pollando reviviĝis post kelkmonata interrompo, akirante belan triĉambran loĝejon. Ankaŭ ĝi eldonas interesan dumonatan gazeton „Vroclavano“-n. Lasttempe ĝi eldonas ankaŭ pollingvan gazeton „Gtas Esperantystov“ (Voĉo de Esperantistoj). Celo de ĉi tiu lasta gazeto estas varbi novajn adeptojn de nia sama ideo: Esperanto.

Ĉiuj gazetoj estas multobligitaj. Sed eldonantoj luktas kun grandaj malfacilaĵoj, mankoj de kapitalo, papero, diversaj limigoj. Tio kaŭzas, ke ili aperas tre malregule kaj en tre malampleksigita formato.

Ankaŭ Vroclava Filio anoncis, ke en februaro komenciĝas elementa Esp. kurso.

Nuntempe en Pollando estas jam dek urboj, kie ekzistas Zamenhofstratoj. En unu urbo ekzistas ankaŭ strato de A. Grabowski, la granda pola Esp.isto, tradukinto de „Sinjoro Tadeo“.

Pardonu al mi mian simplan ling-

(daŭrigo sur la 3a paĝo)

Teatrajeto.

Venis la vespero dum kiu la juna junulklubeto prezentos teatrajton en Esperanto.

Pro ĉi tio la tuta loka Esperantistaro sidigis sin en la intima saloneto.

Dum la prezidanto pritraktis la - gravajn - klubaferojn (envenintaĵojn kaj programon por la venonta kunveno), la geaktorj malantaŭ la kurtenoj febre kuris de la scenejo al la tualetejo kaj returnen. La plimulto el ili hodiaŭ debutas kaj la nerveco preskaŭ tremigis la aeron. La „avo” serĉis sian longan barbon kaj la suflo ro kriis alarmon pro la roloj netroveblaj. Ĝuste kiam la prezidanto, kiu jam longan tempon finis pri la klubaferoj, scivole rigardis tra inter la kurtenoj, ĉio estis preta. El la suflorejo ankoraŭ kelkaj ordonoj kaj - tri solenaj gongobatoj anoncis la komenciĝon de la spektaklo.

La unuan kvaronhoron ĉio glate marŝis sed, ho ve, iom post iom evidentiĝis ke la debutantoj ne sufiĉe bone lernis siajn rolojn. Ruĝiĝo de la kapoj kaj singardaj rigardoj al la suflorejo klare montris, kiam la helpo de la suflo ro estis bezonata. Ĉi tiu tiam flustre diris la necesajn vortojn kaj poste eĉ tutajn frazojn. Nu, mi ne estus skribinta ĉi tiun rakonton, se la flustrado estus ordinara; sed tia ĝi ne estis, ĉar la suflo ro flustris tiel laŭte ke eĉ la homoj en la malantaŭa parto de la salono bo-

ne povis aŭdi lin. Tamen la Esperantistaro ne estis postulema, kvankam la vizaĝoj havis la mienon ke ili ĉiun momenton atendis eksplodon aŭ ion tian sur la scenejo. Kaj - „io tia” venis!

La „avo”, helpe de la suflo ro, longan tempon parolis kun sia filino kaj dum ke li koleriĝis kaj volis bati la knabimon - falis zia barbo teren. La homoj en la salono larĝe malfermis la okulojn; la metamorfozo de la avo kaŭzis, ke li subite similis al filo de sia filino Momenton li stulte silentis sed la voĉo suflo ro ordonis (nacilingve): „daŭrigu, daŭrigu!”, kaj la malfeliĉa maljunulo balbute daŭrigis. Lerte la filino piedfrapis la sur la planko kuŝantan barbon en la direkton de la suflo ro, sed kiam la mano kun tuta brako de la suflo ro etendiĝis kaj videbligis por forpreni la barbon, la publiko ne povis ne ekridi laŭte!!

Ĝis la fino la avo ludis sen barbo kaj ĝis la fino la suflo ro „antaŭinformis” la geesperantistojn en la salono pri la tekstoj. Sed malgraŭ ĉio, la aplaŭdo estis elkora, kaj la geaktorj, kiel faras ankaŭ la profesiaj, revenis sur la scenejon por danki. Ĉu estas mirige, ke, kiam la suflo ro tiam ankoraŭ flustris (pli laŭte ol la aplaŭdado): „Faru reverencon”, la manfrapado jariĝis tondra?



La listo de la aliĝintoj aperos en la junia nro. Ĉu ankaŭ v i a nomo troviĝos sur ĝi?

(Daŭrigo. Por la komenco vidu nian antaŭan nron).

Vi povas kunlabori en:

La Dokumentado kaj Gazetarservo
- D.G. - (zorganto: M. Duc Goninaz,
12 Place de la Republique, Paris
10) PER:

- sendado de ĉiuj artikoloj esperantlingvaj aŭ nacilingvaj, ĉerpi-taj el gazetoj pri TEJO;
 - informi ĝin pri landaj aŭ lokaj kunvenoj de TEJO--anoj, gravaj decidoj aŭ sukcesoj sur la nacia tereno;
 - zorgado pri aperigo en la esperantlingvaj aŭ nacilingvaj gazetoj kaj bultenoj en viaj landoj de la informoj, kiujn vi ricevas de la D.G. pere de „Gazetara Bulteno” aperanta ĉiutrimonate (ĉi tiun bultenon ricevas nur la perantoj);
- Kvankam ĉi tiu kunlaboro unua-loke celas la perantojn, ankaŭ la membroj laŭpove kunhelpu.

La vojaĝservo - V.S. - (zorganto: Kurt Meyer, Parkstrasse 99, Bremen, Germ.).

Ĝi kolektas la adresojn de TEJO-anoj, kiuj estas pretaj gastigi aliajn TEJO-anojn. Se vi do intencas vojaĝi alilanden, sendu al la V.S. detalan priskribon pri via vojo kaj pri preferataj tranoktlokoj. Se troviĝas en tiuj lokoj TEJO-anoj gastamaj, vi ricevas iliajn adresojn, por ke vi povu lettere kontakti kun ili kaj ekscii detalojn. Ankaŭ provizos la V.S. vin per prospektoj **E-lingvaj** pri la vizi-tota lando, per informoj pri necesaj dokumentoj, vizoj, kurzoj, ktp. Ĉar la V.S. ĉefe estas memhelpo, ankaŭ vi laŭpove klopodu ebligi al aliaj la samon. Se do vi havas la bonŝancon povi gastigi samidean(in)on, vi kon-taktu kun la V.S. kaj sciigu al ĝi: viajn nomon kaj adreson; kiom da personoj povas samtempe gastloĝi ĉe vi; se gravas por vi: preferataj sekso, aĝo kaj religio de la gasto.

Se vi deziras respondon de la V.S. aldonu unu int. respondkuponon. Se temas pri loĝado ĉe samidean(in)o, aldonu du.

(daŭrigo de la 1a paĝo)

von, eblajn erarojn kaj stilon, sed mi estas Esperantisto-memlernanto. Foresto de konataj E-istoj, kun kiuj mi povus fari Esperantlingvan kon-versacion kaj ankaŭ poŝtlimigoj, mal-permesantaj pagi abonkotizojn kaj fari pagojn por Esperantaj gazetoj kaj libroj, donas minusan pozicion. Sed ke rezulto estu plusa, mia laboro de memlernado devas pligrandigi. Mi estas plenespera, ke iam mi estos vera Esperantisto kaj aktive povos hel-

pi almenaŭ iom al la venko de Esperanto.

Nun mi estos tre dankema, se iu el la TEJO-anoj volus skribi al mi iom pri Esperanto-movado en aliaj landoj.

Jain anticipe mi dankegas.

Finante mian leteron mi ankoraŭ-foje dankas por la ricevita gazeto kaj deziras al vi kaj tuta Redakcio kaj Administracio de „La Juna Vivo” grandan feliĉon kaj benon, grandajn rezultatojn en via laboro.

Mia mano restas etendita al vi.

Leszek Dobrowolski, Tarnów, Moniuszko-str. 8, Pollando-Pologne.

Helpo al gejunuloj en nepagipovaj landoj.

En diversaj landoj, ekz. Ĉeĥoslovakujo, Bulgarujo, Hungarujo, Polujo, Rumanujo, ne eblas transigi monon al la okcidentaj landoj. Tial multaj gejunuloj ne povas aliĝi al nia organizo. Ĉar ili ricevas malmultajn E-legaĵojn el la eksterlando, estas nia morala deo helpi ilin. Sekve vi povas kunlabori sendante vian LJV-n post la legado (presaĵo kaj do malmultekoste) al amik(in)o en unu el tiuj landoj. Se vi pretas helpi, vi kontaktu kun la Sekretario de T.E.J.O. Lombokstrato 2, Leeuwarden. Nederlando, kiu disponas pri multj adresoj.

La Informa Fako. - I.F. -

Ĝi celas i.a. propagandi nian organiza-

nizon ĉe Esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al ĝi, kaj ĉe ne-Esperantistoj. Ĉar ĉi-tiu posteno nuntempe vakas, ni poste pli detale priskribos la koncernajn taskojn, kaj la multajn eblecojn per kiuj vi povas kontribui al tiu plej grava laboro.

Kunlabori vi ankaŭ povas en nia organo. Sendu verkaĵojn, partoprenu enigmajn kaj aliajn konkursojn. Kaj uzu nian rubrikon „Ĉu ne?“ en kiu vi povas skribi viajn rimarkigojn, ri-proĉojn ktp.

Geomikoj, vi vidas: la eblecoj kunbatali kun ni por nia belega idealo estas multaj. Ni vin urĝe bezonas por ke nia T.E.J.O. kresku.

Nia devizo do estu: **EK AL LA LABORO!**

F. H. Kat.

Nia Libro-Servo staras je via dispono. Ĉu vi jam mendis ion?

LA JUVEL-LARMOJ DE SAMEBITO DE PASTRO W. J. DOWNES.

Unu tagon, dum Totaro transiras la Longan Ponton de Seta, li vidis strangaspektan kreitaĵon. Ĝi havis homan korpon kun haŭto pli nigra ol la haŭto de negro; kun okuloj ardantaj kiel smeraldoj, kaj kun barbo kiel la barbo de drako. Totaro pli ol iom konsterniĝis, kiam li vidis tian eksterordinaran estaĵon, sed en ĝiaj verdaj okuloj sin montris tiom da malĝojo, ke Totaro kuraĝis fari demandojn, al kiuj la strangulo respondis:

„Mi estas Samebito (= Ŝark-viro) kaj ĝis antaŭ nelonge mi servadis la Ok Drakegoj-Reĝojn kiel subofi-

ciro en la Draka Palaco. Sekve de malgranda kulpo oni ekziliŝ min el tiu glora loĝejo, kaj eĉ malpermesis al mi naĝi en la maro. De tiam mi estas treege malĝoja, nepovante trovi ŝirmejon aŭ nutraĵon. Kompatu min, bonkora sinjoro! Trovu por mi ŝirmejon kaj donu al mi manĝaĵojn!”

La humileco de Samebito kortuŝis Totaron, kaj li kondukis lin al lage-to en sia ĝardeno kaj tie provizis al li sufiĉan nutraĵon. En ĉi tiu trankvila kaj aparta loko la stranga markreitaĵo restis dum preskaŭ duonjaro.

Nu, en la somero de tiu jaro okazis granda virina pilgrimo al la Templo nomata Miidera, kiu troviĝis en la apuda urbo Otsu. Totaro ĉeestis la feston, kaj tie li vidis ĉarmegan junulinon. Ŝia vizaĝo estis bela kaj pura kiel neĝo, kaj la beleco de ŝiaj lipoj certigis al la rigardanto, ke ĝuste ilia parolo sonos „tiel dolĉa, kiel la voĉo de najtingalo kantanta sur prunarbo.”

Totaro tuj enamiĝis kun ĉi tiu knabino. Li eksciis, ke ŝia nomo estas Tamana; ke ŝi ankoraŭ estas fraŭla; kaj ke ŝi volas resti tiel, ĝis junulo povos donaci al ŝi kesteton enhavantan ne malpli ol dek mil juvelojn.

Kiam Totaro eksciis, ke ĉi tiu ĉarmulino estas gajnebla nur per tio, kio ŝajnis al li esti neebla donaco, li diris returne hejmen kun peza koro. Ju pli li pensis pri la bela Tamana, des pli li enamiĝis kun ŝi. Sed ho ve! neniu malpli riĉa ol reĝido povus fari tian fianĉigan donacon - dek mil juvelojn!

Totaro ĝismalsane ĉagreniĝis, kaj kiam kuracisto vizitis lin, tiu ree balancis la kapon kaj diris: „Mi povas fari nenion por vi, ĉar nenia medikamento povas kuraci la proaman malsanon”. Tiel dirinte, li foriris.

Nu, Samebito iel eksciis pri la malsaniĝo de sia mastro, kaj kiam la novaĵo atingis liajn orelojn, li forlasis la ĝardenlageeton kaj eniris la ĉambron de Totaro.

Totaro ne parolis pri siaj propraj ĉagrenoj. Li estis plena de koncerno pri la bonfarto de ĉi tiu mar-kreitaĵo.

„Kiu donos al vi manĝaĵojn, Samebito, kiam mi estos mortinta?” li diris malĝoje.

Kiam Samebito vidis, ke lia bonkora mastro estas mortanta, li aŭdi-

gis strangan ekkrion kaj komencis plori. Li ploris grandajn larmojn el sango, sed kiam ili tuŝis la plankon, ili ŝanĝiĝis en ardantajn rubenojn.

Kiam Totaro vidis tiujn juvelolarmojn, li kriegis pro ĝojo, kaj de tiu momento nova vivo venis al li. „Mi vivos! Mi vivos!” li kriegis kun granda raviteco. „Mia bona amiko, vi estas pli ol repaginta al mi la nutraĵojn kaj ŝirmadon, kiujn mi donis al vi. Viaj mirigaj larmoj estas alportintaj al mi nedireblan feliĉon.”

Tiam Samebito ĉesis plori, kaj petis sian mastron havi la afablecon klarigi sian surprize rapidan resaniĝon.

Do Totaro diris al la Ŝark-viro pri sia amafero kaj pri la doto postulata de la familio de Tamana. „Mi pensis”, aldonis Totaro, „ke mi neniam povos akiri dek mil juvelojn, kaj estis tiu penso, kiu tiom alproksimigis min al la morto, sed nun, viaj larmoj ŝanĝiĝis en juvelojn, kaj per ili la junulino fariĝos mia edzino.”

Totaro ekkalkulis la juvelojn kun granda avideco. „Ne sufiĉaj! Ne sufiĉaj!” li ekkriis kun maldolĉa senreviĝo. „Ho, Samebito, estu afabla kaj ploru iom pli!”

Ĉi tiuj vortoj kolerigis Samebiton. „Ĉu vi opinias”, li diris, „ke mi povas plori en unu momento laŭvole, kiel virinoj? Miaj larmoj venas el mia koro; ili estas la signo de vera kaj profunda malĝojo. Mi ne plu povas plori, ĉar vi estas denove sana. Sendube, la nuna momento estas tempo por ridado kaj gajeco, ne por larmoj.”

„Se mi ne akiros dek mil juvelojn, mi ne povos edziĝi kun la bela Tamana”, diris Totaro. „Kion mi faru? Ho, bona amiko, ploru, ploru!”

Samebito estis bonkora kreitaĵo.



NE RESPONDECAS
T.E.J.O.

Mi legis en La Juna Vivo la artikolon de D-ro William Solzbacher pri „end” kaj mi skribas ĉi tiun leteron al vi:

„Pli da lumo pri -end, se vere la difino de -end estas: devas esti -ata, sendube ĝi estas Esperanta verbo kaj nenia afikso. La du voĉdonoj, kiuj ne akceptis la difinon nuligis sin, ĉar -end sen difino estas nur tri literoj de la alfabeto.

Mi petas al la anoj de la Esperanto Akademio en la nomo de nia Kara Majstro, ke ili elĵetu la trileteron -end-el la mirinda Zamenhofa afiksaro.

Post paŭzo li diris, „Mi ne povas elverŝi pli da larmoj hodiaŭ. Ni iru morgaŭ al la Longa Ponto de Seta, kaj ni kunportu sufiĉan provizon da vino kaj fiŝoj. Povas esti, ke kiam mi sidos sur la ponto kaj rigardados al la Draka Palaco, mi denove ploros, pensante pri mia perdita hejmo, kaj sopirante iri returne al ĝi.”

La morgaŭan tagon do ili iris al la Ponto de Seta, kaj post kiam Samebito trinkis multe da vino, li rigardadis en la direkto al la Draka Regno. Baldaŭ liaj okuloj pleniĝis de larmoj, ruĝaj larmoj, kiuj ŝanĝiĝis en rubenojn, tuj kiam ili tuŝis la ponton. Ne multe maltrankviligante sin pri la malĝojo de sia amiko, Totaro

Kiam mi vidis skribita „devas esti ata”, mi miris pri la cerbo, kiu ellaboradis end kiel afikson, kiam la plej taŭga radiko, enmetita en la spaco inter esti -ata bonege sufiĉas. Ekzemple:

La libro devas esti legata.

La kotizo devas esti pagata.

Nenia dubo ĉi tie pri la difino de la senco.

Tre plaĉos al mi, ke vi sendu ĉi tiun leteron al Dr William Solzbacher, por ke li prezentu ĝin al la Esperanta Akademio, mi ne havas lian adreson.

Se vi mem volas meti ĝin en „La Juna Vivo” mi estos tre dankema.

Mi havis longan spertadon de la gramatiko de Esperanto, ĉar mi fariĝis instruistino de Esperanto sub la edukaj aŭtoritatoj de Anglujo dum multaj jaroj (de 1909a).

Kore kaj sincere via kunlaboranto pri la Kara Lingvo.

Lizzie Padon, FBEA, 82 Hampton Rd. Southport-Lane, England.

kolektis la juvelojn, kaj trovis, ke fine li havas dek mil brilajn rubenojn.

Ĝuste en tiu momento ili aŭdis la sonon de dolĉa muziko, kaj el la akvo leviĝis nubosimila palaco, rebriligante ĉiujn kolorojn de la subiranta suno. Samebito eligis ekkrieton de ĝojo kaj saltis sur la parapeton de la ponto, dirante, „Adiaŭ, mia mastro! La Drakaj Reĝoj alvokas min!” Dirinte tiujn vortojn, li saltis de la ponto kaj iris returne al sia antaŭa hejmo.

Totaro sen ia prokrasto donacis la kesteton enhavantan dek mil juvelojn al la gepatroj de Tamana, kaj en ĝusta tempo edziĝis kun ilia bela filino.

La aliĝilo validas nur kun samtempa pago. Ne forgesu pagi vian kongreskotizon.

LERNEJOJ KAJ LERNEJTEMOJ (2).

Se infano studas en gimnazio, ĝi volas trovi iun rilaton inter la lernataj temoj kaj la ĉiutage renkontataj problemoj. Teoria instruado estas malplaĉa al la plej multaj; lernante algebron, ili volas povi facile kalkuli hejman problemaron; lernante fremdan lingvon, ili volas povi uzi ĝin, aŭ por paroli sekrete inter si mem, aŭ por kontakti „strangulojn” alilandajn; lernante sciencan, ili volas povi praktiki ĝin per propraj eksperimentoj. Laŭ la unua instrumentado, tiuj deziroj estas almenaŭ iomete plenumataj. Laŭ la dua, ili estas prokrastitaj devige. Ekzemple, laŭ la unua metodo, la infano havas propran eksperimentejon dum la sciencaj kursoj; en la lingvo-klasoj ili povas ludi per la nova lingvo, aranĝante „elimin-ludojn” (laŭ kiuj oni dividas la klason en du partojn, kaj alterne demandas al studentoj de la du partoj; malĝusta respondo sidigas la respondinton; la flanko kies respondistoj superas, venkas); rigardi filmojn, kaj aŭskulti fonograf-diskojn; en la matematiko-klasoj la instruistoj povas flankiĝi iom for de siaj temoj, kaj ekzameni kun la studentoj diversajn atakojn kontraŭ Euklid-geometrio, ktp.

Laŭ la dua metodo, la tempo severe limigas la ekstran laboradon. En klaso kie okazas kunvenoj kvinfoje dum la semajno, montri franclingvan filmon (nepedagogian, sed ordinaran) ne atentinde malŝparas la tempon; en klaso kie okazas nur du aŭ tri pli mallongaj klasoj dum la semajno, tia filmomontrado estus tro temporaba por esti ofte ripetata. Ankaŭ kutimas la instruistoj mem eksperimenti antaŭ scienco-klasoj, anstataŭ devigi la studentojn mem fari tion.

Tamen, en la unua sistemo oni foje tro emas atenti detalojn. Estas bedaŭrinda vero, ke ofte oni trovas ke ĝuste antaŭ la jarekzameno la instruisto devas rapide koncizigi la plej gravajn punktojn, pro manko de tempo, tro malŝparinte la jaron per flankaĵoj. Rezultas, do, ke altaj rezultoj pri la ŝtataj ekzamenoj estas relative maloftaj. Rezulto a (90-100 %, aŭ, en kelkaj lernejoj, 95-100 ½) estas nekutima, ĉar estas fakte ke nur tre malmultaj infanoj povas tiel rapide lerni gravajn faktojn dum tiel mallonga tempo. Pro tio, multaj personoj volas aboli la ŝtatajn ekzamenojn, kaj tio verŝajne ja okazos post ne tre longe.

En la dua sistemo oni devas nur ekzameni la ĉefpunktojn. En lingvistudo tio montriĝas klare. En Eŭropo oni emfazas multe la gramatikon, dum en Usono la gramatika metodo estas forte modifita per plia praktikado je la lingvo mem. Pro plia atento pri gramatiko, la eŭropanoj fariĝas multe pli lertaj pri legado, foje ankaŭ skribado, sed inverse, ofte estas tro gramatikemaj, kaj fidas teknikajn terminojn multe pli ol la logikon kiu fontis la terminojn. Kiel gravas, ekzemple, la informo ke „prepozicio okazigas ĉiam la akuzativon” pri multaj lingvoj, kiam tiu frazo mem estas plej absurda (pri tio vidu Jespersen, kies verkoj pri lingvo fariĝis aŭtoritategaj)? Ano de la unua sistemo ja povis pli klare ekzameni la lingvon, kaj lerni ĝustajn individuajn formojn ol povas la eŭropanoj. Estas multe pli granda emo ĉe eŭropaj studentoj reguligi lernatajn lingvojn, kaj malatenti esceptojn, ol ĉe la usonaj.

(daŭrigota)

Vieno, en la Februaro 1953.

Al la

„Landa Sekcio de Junulara Ruĝa
Kruco!”

Ni atentigas vin pri la decido
(punkto 16) el la 5-a konferenco de
la interkonsiliganta komitato de la
Junulara Ruĝa Kruco (JRK) en Ĝe-
nevo (3-a ĝis 5-a de Decembro 1951)
kaj citas ĝin:

„La plenuma komitato informas
sin pri la regreso de la internacia in-
terkorespondado de la gelernantoj
kaj rekomendas, ke kelkaj landaj
sekcioj **elprovu novajn metodojn**, por
ekfunkciigi diversmaniere la kores-
pondadon inter la junularaj grupoj
de unu lando al alia celante:

a. plibonigon de la internacia inter-
kompreniĝo,

b. pli bonan publikigon pri la JRK-
laboro en la diversaj landoj.

Ĉi tiuj provoj ebligu al la inter-
konsiliganta komitato elekti, kiuj me-
todoj estos internacie uzebraj”!!!

Nia societo atentigas vin ankaŭ pri
la rezolucio decidita **unuanime** la 7-
an de Aprilo 1921 okaze de la 10-a
internacia konferenco de la Ruĝa
Kruco en Ĝenevo. Jen la teksto de ĉi
tiu rezolucio:

„Konstatinte la fakton, ke la ling-
va malfacilaĵo multmaniere **malhel-
pas** la realigon de l'internacia idealo
de la Ruĝa Kruco, la 10-a konferenco
**instigas ĉiujn ruĝkrucajn organi-
zojn**, ke ili disvastigu la lernadon de
la helplingvo ESPERANTO inter siaj
anoj kaj **speciale** ĉe la junulaj sekci-
oj, kiel **unu el la plej potencaj rime-
doj** al internacia kompreniĝo kaj

kunlaborado laŭ la celo de la Ruĝa
Kruco.”

Per la aludo al ĉi tiu rezolucio kaj
al la grava instigo enhavanta en ĝi,
kies realigo bedaŭrinde sekve de la
dua mondmilito estis ĉesigita, nia so-
cieto permesas al si, atentigi **ĉiujn
landajn JRK-organizaĵojn** pri la jam
antaŭ multaj jaroj decidita rezolucio.

Ni invitas pro tio **ĉiujn landajn
JRK-organizaĵojn en la tuta mondo
realigi** la menciitajn instigojn.

Krome estas tre necese, **ĝustatem-
pe** sendi urĝan proponon pri la en-
konduko de ESPERANTO al la Cen-
tra oficejo de la JRK en Ĝenevo, 26,
Beau Séjour, Svisujo.

La Ĝenerala uzado de ESPERAN-
TO **treege akcelus** la idealan kaj
praktikan valoron de la korespon-
dado inter la junularaj grupoj de la
Ruĝa Kruco. (Ĉia traduko el la frem-
da lingvo estus per tio **superflua!!!**)
(La partoprenantoj de ESPERAN-
TO-kursoj en la lernejoj de Aŭstrio
jam kutimas viglan interŝanĝon de
leteroj kun esperantistoj de multaj
landoj!!!).

Ni estus tre dankemaj, se vi
laŭeble baldaŭ sendus al ni mallon-
gan raporton pri viaj paŝoj faritaj en
ĉi tiu afero.

En la nomo de la „Societo de
Aŭstriaĵ ESPERANTO-Instruistoj”
signas:

Leopold Gschanes, m.p. Sekretario.
dir. Franz Menacher, m.p. Estro.

La alvoko estas jam forsendita al
32 landaj „Junularaj Ruĝ-Kruc-Or-
ganizoj”.

K.E.L.I. KONFERENCO EN 1953.

Post la U.E.A. kongreso en Zagreb
la K.E.L.I. anaro konferencos en
Svislando ekde la 4-a ĝis inkluzive
la 10-a de Aŭgusto.

Temoj, diskutoj, ekskursoj, distra-
joj k.t.p. estos la programo de la kon-
ferenco.

La renkontiĝo okazos en Rüdlin-

gen, urbeto inter Eglisau kaj Andel-
fingen en la bela norda regiono de
Svislando, proksime de Schaffhausen.

La aranĝoj estas en la manoj de
Svisaj K.E.L.I. anoj kaj por informoj
oni sin turnu al:

S-ro Fritz Liechti, Wallisellenstrasse
429, Zürich 50, Svislando.

Internacia Grupo Esperantista de Morala Rearmado. Unua asia MRA-konferenco malfermita en la ĉefurbo de Ceylon.

La nordaj landoj sendis komune 50 personojn per flugmaŝino al la konferenco en Ceylon. 300 delegitoj de 17 landoj partoprenis en la malfermo de la unua asia konferenco de Morala Rearmado en Colombo la 24an de oktobro 1952. Inter la multaj reprezentantoj de Ceylon troviĝis la justecministro, membroj de la parlamento, la fakmovadoj kaj la labordonant-organizaĵoj.

Membro de la siama delegacio, d-ro Vichien, kiu estas direktoro por la kultura ministerio de Siamo, rakontis al la ĉeestantoj, ke la registaro de Siamo per sia buĝeto donis sumon al la laboro por Morala Rearmado en Siamo.

Libro pri la principoj de MRA estas farita kaj eldonita en 50.000 ekzempleroj. La episkopo George West de Rangoon priskribis la prosperon de MRA inter ĉiuj rasoj kaj klasoj en Birmo.

Kune kun li staris sep budamonaĵoj vestitaj per flavaj roboj, kaj oni ankaŭ rimarkis la vicabaton de la monaĥejo de Aletawya en Rangoon, U. Narada, kiu lastjare vizitis Caux.

Ni petas niajn legantojn bonvolu respondi per poŝtkarto, se vi daŭre deziras ricevi, senpage la „Inform-

La delegitoj de la pacifiklandoj prezentas la popolojn de Aŭstralio, Nova Zelando kaj Nova Geneo. Kvar ennraskitoj de papua estis prezentataj, kiel la unua delegacio de Papua kiu iam partoprenis en internacia Konferenco.

Kvin membroj de la amerika registaro sendis la jenan telegraman saluton: Tiu intereso, kiun la universala ideologio venkis en la oriento kaj okcidento estas feliĉa signo de la nova tago. Kun sincera konvinko ni staras malantaŭ vi en tiu-ĉi historia konferenco.

Kiam la konferenco de Ceylon finiĝas, oni daŭrigas en Hindujo, kie la registaro donis dormveturilojn al la dispono de dr Buchmann kaj al lia granda internacia MRA akompanantaro; la vojaĝo daŭras dek semajnon. La veturiloj taŭgas samtempe kiel loĝejo kaj transportilo en Hindujo. Birmo sendis dek sakojn da rizo al Hindujo al la helpo de la multaj, eksterlandanoj.

(Traduko de la dana „Novaĵservo”) de Morala Rearmado, Lendorff.

ilon”. Dankemaj ni estas por ĉiu konsilo au sciigo pri Morala Rearmado en via lando.

Internacia Grupo Esperantista de Morala Rearmado.
P. Lendorff, Nordgaarden 7, Køge, Danlando.

EL MALPROKSIMA ORIENTO.

Ie malproksime, oriente de Suez, estas lando, kie laŭ la reguloj de la tradicio la virinoj devas iri malantaŭ la viroj, kvazaŭ bone dresitaj hundoj. Almenaŭ estis tiel antaŭ la dua mondmilito.

Nun post la milito eŭropano, kiu revenis en tiun malproksiman regionon, konstatis kun granda ĝojo, ke la

kutimo ŝanĝiĝis: nun la virinoj iras antaŭ la viroj. Fine, li pensis, la progreso venas ankaŭ ĉi tien!

Lia ĝojo daŭris, ĝis li eltrovis, ke oni ankoraŭ ne sukcesis forigi ĉiujn minojn metitajn en la teron dum la milito. Tial la „antaŭeniĝo” de la virinoj estas tre praktika - por la viroj

la burgono



MONATA ORGANO
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ

LA KATOJ DE MIA AVO.



Mia avo havis tri katojn. Li multe amis ilin. Ankaŭ la katoj multe amis lin.

Mia avo laboris dum la tuta tago. Vespere li revenis hejmen. La katoj iris renkonte al li ĝis la stratangulo. Ili staris tie flanko ĉe flanko, rektigis siajn vostojn en supran direkton. La avo karesis la ŝatatajn bestojn kaj ili murmuradis kontente.

Post la reciproka salutado la katoj turnis sin, flanko ĉe flanko, starigis siajn vostojn kaj paŝis antaŭ la avo ĝis la pordo de nia domo. La saĝaj bestoj paŝis trankvile kaj malrapide. Ili sciis, ke ni ne vespermanĝos antaŭ ol la avo estas hejme.

Iam, en la komenco de la vintro la avo malsaniĝis. Li ne povis iri al sia laboro. La pordo de lia ĉambro estis ŝlosata, la katoj ne vidis lin.

La tri katoj ne sciis, kio estas al la avo. Ili iris ĉiu vespere en la kutima tempo por renkonti la avon. Ili iris ĝis la angulo de la strato kaj tie atendis, atendadis.

Ĉar la avo nevenis, ili returnis hejmen tre malĝojaj, kun mallevitaj vosto.

Ĉiuj najbaroj mire rigardis la konduton de la bestetoj.

Foje maljuna almozpetanto trapasis nian urbon. Liaj vestoj estis eluzitaj, tamen tre puraj. Lia barbo estis blanka. Dum la irado li uzis bastonon.

Li similis mian avon.

La malriĉulo preterpasis la stratangulon. Kun ĝojo la katoj salutis lin. Ili starigis siajn vostojn kaj paŝadis kaj repaŝadis inter liaj kruroj. La maljunulon kortuŝis la amika saluto de la tri katoj. Li karesis la dorson de la bestoj. Kaj li murmuradis: „Dio mia, kiaj bonanimaj katoj ili estas!”

Poste, vere kontentaj, la katoj ekmarŝis antaŭ li. La maljunulo kun miro rigardis la bestojn, kaj kun scivolemo li sekvis ilin. Li iris post la katoj ĝis la dompordo de mia avo.

La familio ĝuste volis eksidi al la tablo por vespermanĝi. Por ne montri sin malpli helpema ol la bestoj, oni afable invitis la malriĉulon sidi en la avan brakseĝon kaj kunmanĝi.

Kun bona apetito manĝis la maljuna almozulo. Dum li purigis sian teleron, li ĝemis kaj diris:

„Mia Dio, kia bona urbo! Oni sendas afablajn katojn por montri al la malriĉaj fremduloj la vojon al komplezemaj homoj.”

Laŭ Paul Arêne, dekaŭ jarcenta franca verkisto J. Mandin, Angers.

LA ARDEO.

Serenis la naturo iun frusomeran vesperon. Trankvile fluis la klaraj akvoj de rivero. Surborde mi vidis belan birdon kun larĝaj, grize-brunaj flugiloj. Jen plenkreska ardeo, alta je tri futoj. Malrapide ĝi eniris la akvon, travadis mallongan distancon, tiam haltis.

Tie ĝi staris absolute senmove. Pasis minutoj unu horo du horoj — kaj tamen la birdo aspektis kvazaŭ statuo. Mi diris al mi: „Ĉu ĝi dormas, ĉu ĝi glaciĝis? Eble ĝi paraliziĝis.”

Sed fikse rigardante ĝin mi vidis, ke la viglaj okuloj moviĝis. — sekve la birdo sendube vivas.

Ankaŭ la riveraj fiŝoj trompiĝis pro la sinteno de la ardeo kaj ili ne plu timis la grandan birdon. Senzorge unu fiŝo preternaĝis. Aplombe ĝi svingis la voston. Ĝi certe ne timas. Ho ne! Sed — ho ve! Kio okazas? Fulmrapide antaŭen klinis la ardeo sian longan nukon, kaj trapikita estas la surprizita fiŝo per la akrepinta beko de la ardeo. Avide glutata estis la viktimo eĉ sen dispecigado.

Post momento, denove la ardeo aspektis kvazaŭ statuo — atendante, atendante aŭ fiŝon aŭ ranon. Ĉi maniere kutimas la ardeo kapti siajn ĉiutagajn manĝojn.

Vespere mi vidis ĝin survoje al la hejmo. Malrapide, kun samspeculoj, ĝi gracie ŝvebis trans la pacajn akvojn al la ruĝa subiranta suno.

Aplombe kaj senzorge la fiŝoj nun povas svingi la voston. Sed morgaŭ ili devos sin gardi, ĉar la ardeo sendube revenos.

Hylde Mayne, lernantino de S-ro G. Tordof.

Kiel plej bone utiligi kaj studi La Burĝonon?

1. Laŭtleĝu rakonton. 2. Reskribu ĝin en viaj propraj vortoj. 3. Komparu ĝin kun la originalo. 4. Korektu viajn erarojn.

Ni ĝojos ricevi similan rakonton verkitan de vi. Se la verketo estas taŭga, ĝi aperos en la Burĝono.